

Duonjarcento de Sennacieca Asocio Tutmonda, 2-a parto

Claude Gacond, 405-a radioprelego, 1971.07.14 & 17

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tiun ĉi someron Sennacieca Asocio Tutmonda festos duonjarcenton de ekzistado. Ni partoprenas tiun jubileadon dediĉante kelkajn radio-elsendojn al la priskribo de la ĉefaj etapoj de la historio de SAT.

A.- La pasintan semajnon ni montris, ke Zamenhof, Hector Hodler kaj Eŭgeno Lanti estas inter la malmultaj pensuloj, kiuj kapablis enkorpiigi sian personon en socian estaĵon. Al Zamenhof ni ŝuldas esperanton mem, al Hodler Universalan Esperanto-Asocion kaj al Lanti Sennaciecan Asocion Tutmondan.

Cl.- Lanti tute konsciis, ke li naskis novan estaĵon. Li eĉ antaŭvidis, ke tiu estaĵo estos vokita ludi gravan rolon, tio post periodo de embria vivo. Aŭdu lin :

A.- *« Ĉar ni estas samlingvanoj, ni volas tuj profiti tiun rimedon por kvazaŭ embrie funkciigi societon, kiel povos estonte funkcii la universala socio. »*

Cl.- Por Lanti tiu societo havas edukan rolon. Ree ni citas lin :

A.- *« Nia Asocio ne devas esti politika organizaĵo, laŭ la mallarĝa senco de l' vorto. Ĝi estu eduka, kleriga, helpa, realiga ; tiele ĝi estos pli revoluciiga ol la politikaj partioj, kiuj celas precipe fari partianojn, ne konsciajn revoluciulojn, tio estas homoj en kies menso formalaperis la malnovaĵoj kaj eniris ecoj ebligantaj novan socisistemon. »*

Cl.- Tion li diris responde al rusa kamarado, kiu deziris, ke la fondota Sennacieca Asocio Tutmonda sekvu la vojon de la Tria Internacio aŭ rusa komunismo. Al tiuj partianoj, kiuj ne volis sin malfermi al sennaciema vivo, Lanti ankoraŭ prave respondis :

A.- *« Mi ne laciĝos ripeti, ke ni devas precipe celi praktikecon. Se ni jam enŝovas la ĉi-tiu-tempajn partiajn pasiojn en nia tendaro, ni iros certe al bela fiasko. Unu el niaj taskoj estas la eldono de bona literaturo konforma al nia idealo. Nu, ĉu do ne estas eble por nesampartianoj, sed samcelanoj, interkonsenti pri verkoj de Maximoviĉ, Gorki, de Leo Tolstoj, de Romain Rolland kaj aliaj aŭtoroj, kiuj staras super la partioj kaj eĉ super la nuntempo ?*

Cl.- Per tiu frazo, kiu malkovrigas al ni en kiuj verkistoj Lanti trovis inspiron, ni malkovras alian gravaĵon. Por Lanti la fondota Sennacieca Asocio Tutmonda devos stari super la partioj kaj eĉ super la nuntempo. Konstante Lanti tion celados, kaj kontraŭ lia influo luktados la partianoj, kiuj rifuzas superpartiajn interŝanĝojn.

A.- Lanti, pere de SAT, celis edukan rolon. Li volis eduki la laboristojn al sennaciismo. Li sin turnis al la laboristoj, ĉar li opiniis, ke la burĝaro ne povas pensi sennaciisme. Pri tiu vidpunkto estus foje interese malfermi debaton. Ĉu li ne samtempe malriĉigis Sennaciecan Asocion Tutmondan de la kunlaboro de multaj ege konsciaj mondcivitanoj ?

Sed estas fakto, ke tre rapide UEA akordiĝis kun la diversaj naciismoj, dum ĝis nun SAT restis pli malpli fidela al sennaciisma mondkoncepto, malgraŭ grandaj malfacilaĵoj.

A.- SAT estis fondita dum la dektria Universala Kongreso de Esperanto en Praha - Prago en esperanto - en 1921. Kunsidis 79 gekamaradoj el 15 nacioj. La Kongresa Protokolo pravas, ke Lanti evitis la vanajn diskutojn, kiujn kaŭzis la miskomprenoj regantaj inter la ĉeestantoj. Lanti volis eviti, ke SAT reduktiĝu al simpla partia tendenco, malprofite al la tendencoj de la malplimulto. Pro tio li sin permesis diri dum la diskuto pri la projekto de la statuto de SAT :

Cl.- « *La Parizaj kamaradoj metis en la projekton de statuto ĉion, kio estas en ili plej bona : sian sperton, sian scion, eĉ iom de sia koro. Se oni ne akceptas tiun statuton laŭ ĝiaj ĝenerala enhavo kaj spirito, la Iniciatanta Komitato rezignos ĉiun oficon. Ni sekvos, sed ni ne volas stari ĉe la direktilo, se ni konscias, ke la vojo sekvenda ne estas la plej bona. »*

A.- Tiam alfrontiĝis la vidpunktoj de la sennaciistoj kun tiuj de la oportunismaj internaciistoj, kiuj volis povi uzi la fondatan asocion nure por disvastigi siajn partiajn vidpunktojn.

Cl.- Dum dek jaroj daŭros tiu luktado ĝis la skismo de 1931, kiam, sub la gvidado de Drezen, la komunistoj forlasos Sennaciecan Asocion Tutmondan.

A.- Kaj kiam oni atente legas la organojn de SAT, oni rimarkas, ke la alfrontado inter la homoj, kiuj celas sennaciisman edukiĝon kaj tiuj, kiuj nure propagandas partiajn vidpunktojn, ne ĉesis.

Cl.- Verŝajne tiu luktado neniam ĉesos, ĝis kiam la sennaciismo venkos. Ni troviĝas antaŭ fenomeno simila al tiu, kiu ekzistis en la esperanto-movado inter la praktikantoj, kiuj provis kreskigi esperanton en si mem, kaj tiuj, kiuj nure proklamis lingvajn teoriojn.

A.- La voĉdono de 1894 kontraŭ lingva reformo ne sufiĉis por silentigi la partianojn. En 1907 okazis skismo, kaj ni scias, ke tiu skismo ne finiĝis. Post la Ido-afero formiĝis partio naturalisma.

Cl.- La novaj ideoj kreskas simile al plantoj. La semoj devas fali en fekundan grundon. Poste ili ĝermas kaj kreskas je propra ritmo.

A.- La novaj ideoj ankaŭ kreskas simile al la bestoj. Ili longe formiĝas en la sino de cerbo, simila al embrio en la ventro de gravedulino. Tiu formiĝo obeas al propra ritmo. Subite okazas la naskiĝo. Kaj la kreskado daŭre okazas laŭ ritmoj al ni konataj, sed kiujn ni ne povas ŝanĝi.

Cl.- Tion bone komprenis homoj kiel Zamenhof, Hodler kaj Lanti. Ili semis. Ili naskis. Kaj poste ili dediĉis sian vivon al la vartado de la novnaskito.

A.- Tion neniam komprenos la sektemuloj. La partianoj, kiuj volis perforte trudi siajn vidpunktojn, anstataŭ sin malfermi al la eksteraj influoj en la kadro de Sennacieca Asocio Tutmonda, mortigis en si mem la vivon.

Cl.- Same faris la reformemuloj, kreante Idon, kaj poste naturalismajn lingvo-projektojn, anstataŭ sin lasi invadi de la lingvo internacia kaj tiel malkovri novan mondon.

A.- Al tiu malkovro, pere de Sennacieca Asocio Tutmonda, Lanti volis kondukis siajn samklasanojn.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-